


ISSN: 0827-3154

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2003/1

printempo / somero 2003

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the Lumo



LUMO

Lumon eldonas dufoje jare KEA, P.O. Box 2159, Sidney, BC, Kanado V8L 3S6
<www.esperanto.ca/kea/>

Lumo ('light') is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association
Lumo ('lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

ENHAVO DE LA NUMERO

Novaĵoj de KEA	3
Informoj pri kaj aliĝilo por la venonta NOREK	3
Salutmesaĝo el Mongolio	4
Internacia Skrablo-ludo esperantiĝis dank' al kanadano	4
Esperantistoj en ĝemelaj urboj serĉataj	5
Raporto pri la renkontiĝo en Otavo, majon 2003	5
Pikniko en Toronto, 17an de aŭgusto 2003	6
Pri la 10a Internacia Renkontiĝo Esperanto en Okemo	6
Deziras korespondi	6
Artikoloj	7
Okemo translokiĝu al Kanado (Y. Bellefeuille)	7
Pri Gestuno/ISL (D. Turcato)	8
Antikva filipina religio (V. Medrano)	11
Internaciaj novaĵoj	12
Lingvaj ekzamenoj en Hungario	13
Gotenburgo: virtuala UK kaj alta protektanto	13
Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 15	13
Junaamiko.inf.hu	14
Lerno-kompleto de ILEI	15
Noam Chomsky: 'Esperanto ne estas lingvo'	16
Esperanto fabelkonkurso: Osmo Buller alvokas	17
Reta Esperanto-lernado eksplodas	18
TTT-ejo de UEA havas novan fasadon	18
Krucvortenigmo (D. Reble)	19
Solvo de la lasta krucvortenigmo (D. Reble)	6
Superzam	20

Kolumno de la redaktoro

Unue, mi kaptu la okazon pardonpeti pro mia eraro en la lasta numero, kie mi parolis pri la libroservo de ESK (p.5), kiam mi devintus aludi tiun de KEA (kiu troviĝas en Montrealo). Mi dankas al Normando Fleury pro tio ke li min avertis pri tiu eraro. Cetere, mi kaptu la okazon gratuli al ESK pro ilia rimarkinda retejo (konsultebla ĉe:

<http://www3.sympatico.ca/esperanto/>).

Due, mi gratulu al ĉiuj, kiuj sendis al mi solvojn de la lasta krucvortenigmo, ĉar ĉiuj, kiuj min atingis, estis korektaj. Tamen, tiu kiu ricevas la premion estas Ken Price (Toronto, Ontario), kies solvo alvenis la plej frue; konsolan premieton ricevas Colin Sawatzley (Vernon, Brita Kolombio). Ĝustajn solvojn ensendis ankaŭ Jean Alain (Gatineau, Kebekio) kaj Merlo kaj Guy Matte (Otavo, Ontario). Finfine, mi (kiel kutime!) ŝuldas grandan dankon al Steĉjo Norvell pro lia kompostado.

Limdato por la venonta
numero: 20a de decembro 2003

Geoffrey Greatrex
1205-261 Cooper strato
Ottawa, Ontario, KANADO K2P 0G3
<greatrex@uottawa.ca>

Novaĵoj de KEA

INFORMOJ PRI LA VENONTA NOREK

(NordOkcidenta Regiona Esperanto-Konferenco de NordAmeriko)

Dato de NOREK: septembro 5, 6, 7, 2003.

La konferenca motelo estas: La Victoria Airport Travelodge, 2280 Beacon Avenue, Sidney, BC, V8L 1X1. Mendu vian ĉambron frue! Petu la speciale avantaĝan prezon por NOREK/Esperanto. Uzu la senpagan numeron 1-866-656-1176 por rezervi tranoktadon.

La Konferencejo estas: La Mary Winspear Kultura Centro, 2243 Beacon Avenue, Sidney, BC, V8L 1W9. La konferencejo troviĝas trans la strato de la konferenca motelo je agrabla kaj mallonga promena distanco. Ĉiuj kunvenoj, la interkonatiĝa vespero, festoj, debatoj, programeroj kaj la celebra bankedo okazos en la konferencejo.

Registrado okazos en la Mary Winspear konferencejo de la 3-a ĝis la 5-a horo ptm ĉe la enirejo. Detalan konferencan programon kaj turisman informon provizos al vi niaj gastemaj volontuloj gesamideanaj. La "Interkonatiĝa Vespere" okazos ene de la Mary Winspear konferencejo inter la 7-a horo kaj la 10 horo vespere. La konferenca programo okazos de la 9-a matene ĝis la 10-a vespere sabate kaj de la 9-a matene ĝis la tagmezo dimanĉe. La baza aliĝkotizo estas \$30.00. La prezo pagas por la manĝetoj kaj trinkaĵoj por la "interkonatiĝa vespero", por dumtagaj manĝetoj dum refreŝigaj paŭzoj inter la variaj programeroj, kaj por ĉiuj necesaj luoj de ekipaĵoj kaj materialoj por la ampleksa programo.

La oficiala bankedo kostos \$20.00. Loka firmao provizos ĝin por ni ene de la konferencejo. Se vi deziras partopreni la oficialan bankedon mendu sidlokojn nun, por ke ni povu bone plani pri kvanto. Ankaŭ estos teatra spektaklo por Esperantistoj kaj la ĝenerala publiko en la Teatro Charlie White. Ne estas necesa mendi bileton nun por ĝi. Biletoj estos aĉeteblaj surloke.

La organizanto Wally G. Du Temple estas kontaktebla je telefono 250-656-1767; je telefakso 250-656-0502; kaj retpoŝte je <iwolemskatl@aol.com>

Aliĝilo

Bonvolu kopii la aliĝilon, kaj ĝin kompletigi laŭ via elekto.

Nomo:

Poŝta Adreso:

Strato:

Urbo:

Lando:

Poŝta Kodo:

Retpoŝta Adreso:

Telefona Numero:

Mi sendas la aliĝkotizon de \$30.00 _____

Mi ankaŭ deziras pagi () oble \$20.00 por mendi sidloko/ojn por la bankedo: _____

Sumo _____

Aliĝilo sendota al Wally G. Du Temple, 765 Braemar Avenue, North Saanich, BC, V8L 5G5, Kanado.

SALUTMESAĜO EL MONGOLIO

Sekve de gratulmesaĝo de la prezidanto de KEA, Brian Kaneen, al la Mongola Esperanto-Societo pro la lastatempa fondo de ĉi tiu organizaĵo, li ricevis la jenan respondon de Dogsuren HURELBAATAR, la prezidanto de MES: 'Elkoran dankon al vi pro via gratulmesaĝo. Ni volas starigi amikecan, fruktodonan kaj pragmatan kunlaborojn inter niaj du organizaĵoj kaj esperantistoj. Bonvole transdonu nian amikecan saluton al estraranoj de Kanada Esperanto-Asocio.'

INTERNACIA SKRABLO-LUDO ESPERANTIĜIS DANK' AL KANADANO

'Diversaj studentoj miaj foje demandis pri skrablo en Esperanto. Jen el la zamenhofa ĉielo aperas la respondo,' diras usona inĝeniero Kent Jones, kunaŭtoro de la libro *Aviada Terminaro*. Skrablo ĉe <http://skrablo.ikso.net> estas vere mirinda teknika kreaĵo de la kanada esperantisto Clayton Smith. 'Ĝi aspektas tre bone farita. Mi nur atendas pli da geomikoj por kunludado ... Mi vokos ilin!' rimarkas James Piton el Campinas en Brazilo.


Kiam en 1948, la usona arkitektisto Alfred M. Butts inventis skrablon (<http://scrabble.com>), li volis krei ludon por anglaj parolantoj, kiu baziĝas po duono sur ŝanco kaj povo. Ekde 1953, la ludo disvastiĝis en Aŭstralio kaj Britio, kaj poste en la cetera mondo. Hodiaŭ jam pli ol 100 milionoj da skrabloludoj, en 29 diversaj lingvoj, estis venditaj en 121 landoj de la mondo. La ludo fariĝas tutmonda: la unua mondkonkurso okazis en Londono en 1991 kaj la dua en Novjorko en 1993. Sed en kiu lingvo ludi? Ĉu nur en la angla malavantiĝigante nedenaska parolanto de la angla? Per teknika programo ĉe paĝo: <http://skrablo.ikso.net>, la kanada esperantisto Clayton Smith (Argilo) solvis la problemon. Oni ludu interrete internacian skrabloludon per la neŭtrala kaj tutmonda lingvo Esperanto. Kiom da tempo Smith bezonis por skribi la programon? 'Mi mem ekhavis la ideon antaŭ proksimume du jaroj. Mi tuj ekprogramis, kaj lanĉis la unuan version de la skrabloludejo je la 1-a de marto, 2002. Mi programis dum ĉirkaŭ ok monatoj en mia libera tempo.'

'Ĉi-momente vi estas la sola ludanto, kiu ĉeestas. Vi povas simple minimumigi tiun ĉi fenestron dum vi interretumas. Vin avertos laŭta sonorilo tuj kiam alvenos alia ludanto,' ofte avertas mesaĝo ĉe la retejo. Post unu jaro da ekzisto 585 ludantoj enskribiĝis vizitante 5706-foje. Dum 24 horoj ofte vizitas malpli ol ses ludantoj. Ĉu do esperantistoj malemas ludi skrablon? 'Ja estas iuj, kiuj vizitas ĉiutage, sed ofte neniu ĉeestas. Eble mi ne sufiĉe bone reklamis la ludon,' agnoskas Smith. Tamen en majo 2002 Esperanto-Ekspreso de Radio Polonia aŭdigis intervjuon pri skrablo-programo. D-ro A Giridhar Rao, ĝenerala sekretario de Federacio Esperanto de Barato, konas la problemon kaj havas sugeston: 'Kial ne eblas ludi sole? Loĝante en Barato, mi ofte ĉeestas la ludejon kiam neblas por alimondopartanoj tion fari.' Kreinto Smith pripensas solvon: 'Mi nun preparas artefaritan inteligenton por ke oni povu ludi kontraŭ la komputilo kiam mankas aliaj ludantoj. Tio plej verŝajne aperos baldaŭ.'

Neniu el la 44 membroj de la Akademio de Esperanto ŝajne ludas la retan E-skrabloludon. Smith: 'Mi pensas ke ĝis nun mi ne ludis kun akademiano... sed pri tio mi ne certas. Mi vidas nur la kaŝnomojn de la ludantoj,' agnoskas Smith. Ĉu ne akademianoj kaj aliaj elitaj esperantistoj tamen havus pli da ŝancoj gajni kontraŭ meznivelaj esperantistoj? 'Verdire mi ne scias. Mi sufiĉe ofte venkas, sed ja estas iuj, kiuj sukcesas ofte venki super mi. Fakte mi

planas baldaŭ starigi sistemon de ciferaj pritaksoj, similan al tiu ofte uzata ĉe ŝakludo. Poste estos multe pli facile pritaksi, kiuj estas la plej bonaj ludantoj.'

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ



Ĉu ludi skrablon en Esperanto multe diferencas de la ludo en aliaj lingvoj? 'Jes... Ĉefe pro la kunmetado de vortoj. En Esperanto estas multe pli facila fari pli longajn vortojn,' diras Alejandro M. Greene el Kanado. Smith: 'Estas kelkaj diferencoj, sed ne multaj. En Esperanto estas iom pli facile samtempe uzi ĉiujn ok teĝoletojn - kaj tiel ricevi 50 kromajn poentojn. La homoj kiuj plej lerte ludas skrablon nacilingve, plej lerte ludas ankaŭ en Esperanto.'

Kiel oni kontrolas ĉu vorto ekzistas en Esperanto aŭ ne? Ĉu oni uzas la PIV-n? Smith: 'Jes. Sed uzi PIV-on ne solvas ĉiujn problemojn.

La ĉefa problemo estas kunmetitaj vortoj. Kiel decidi ĉu kunmetaĵo validas aŭ ne? Iuj ludantoj pensas ke ĉiuj ajn kunmetaĵoj estu permesataj, eĉ se ili tute ne havas sencon. Aliaj pensas ke kunmetaĵoj devas havi sencon, kaj devas esti uzeblaj en iu reala situacio.'

Ĉu estas pli interese ludi en Esperanto ol naciaj lingvoj?

Smith: 'La ludo mem ne estas pli interesa, sed estas tre interese ludi kun homoj de diversaj landoj. Eblas babili dum la ludado, kaj ofte aperas diskutoj pri alilingva skrabloludado. Kaj certe amantoj de skrablo ĝojas pri tio, ke ili povas ludi en unu plia lingvo.'

Ludu skrablon! <http://skrablo.ikso.net>

Komunikad-centro

ESPERANTISTOJ EN ĜEMELAJ URBOJ SERĈATAJ

La E-ĝelernantoj el Namur (Belgio) estas interesataj korespondi grupe kun grupoj el la ĝemelaj urboj de Namur, tiuj estas: Badalona (Hispanio), Coimbra (Portugalia), Korolev (Rusio), Lafayette (Usono), Longueuil (Kebekio, Kanado), Moncton (NB, Kanado), Northampton (Britio), Parma (Italio), Poitiers (Francio), Syracuse (Usono), Vaasa (Finnlando), Zhengzhou (Ĉinio). Kontakto s-ron Denis Flochon, la gvidanton de la kurso: <denis_flochon@hotmail.com>

RAPORTO PRI LA RENKONTIĜO EN OTAVO, 17-18 MAJO 2003

Sekve al la alvoko de Normando Fleury en la lasta numero de *Lumo*, la otavanaj reagis per invito al samideanoj en Montrealo ĉeesti renkontiĝon en la nacia ĉefurbo. Ĉeestis ĝin 18 partoprenantoj, ses el Montrealo, unu el Kebeko, unu el Toronto, unu el Londono kaj unu el Usono, do sume kvar homoj el aliaj urboj ol Otavo kaj Montrealo. Ne tiom daotavanoj partoprenis, tamen, kiom oni atendis, eble parte ĉar iuj homoj forestis je tiu tempo (inter ili via redaktoro). Okazis komuna vespermanĝo la sabatan vesperon; la sekvan tagon oni renkontiĝis kaj rondiris diversajn vidindaĵojn de la urbo. Plejparte la vizitantoj gastis ĉe otavanoj.

Raporto kompilita de la redaktoro (kun dankoj al Y. Bellefeuille)

PIKNIKO EN TORONTO, LA 17AN DE AŬGUSTO 2003

Dimanĉon la 17an de aŭgusto okazos la tradicia pikniko de la toronta klubo en parko Sunnybrook. Kunportu manĝaĵon/trinkaĵon laŭplaĉe - sed notu ke oni kutime havas pli ol oni povas manĝi! Por pliaj informoj pri la preciza renkontiĝejo, vidu la plej lastan numeron de *La Torontanon* (numeron 67) aŭ konsultu la retpaĝojn de la klubo:
<http://esperanto.ca/toronto/>

PRI LA 10A INTERNACIA RENKONTIĜO ESPERANTA EN OKEMO

La evento okazos de la 11a ĝis la 13a de oktobro 2003 en Okemo, Vermont, Usono. La aliĝkosto estas \$25 (usonaj) aŭ \$10 por studentoj, senlaboruloj aŭ emerituloj. Por aliĝi, bv. skribi al ESK-OKEMO, 6358-A, rue de Bordeau, Montréal, Québec, Canada, H2G 2R8. Eblas aliĝi faksile je: 1-514-272-0151. Por pli da detaloj pri la programo ktp. (kaj aliĝilon), vidu <http://www3.sympatico.ca/esperanto/eo-okemo.htm>

DEZIRAS KORESPONDI

La redakcion ricevis du petojn por korespondi. Unu temas pri reta korespondado: Wangmin en Ĉinio deziras retkoresondi kun kanadanoj. La adreso estas:
 <wangmin666666@hotmail.com>

La alia peto atingis la redaktoron de Nepalo. Temas pri Navin Lal Shrestha, kiu deziras korespondi helikpoŝte kun kanadanoj. Lia adreso estas GPO Box 11753, Kathmandu, Nepalo.

Solve al la Krucvortenigmo en la Lasta Numero

K	O	M	O	D		P	R	I	V	I	L	E	G	I
A	R	A	N	E		S	A	M	E		A	T	O	M
S	T	R	I	G		A	T	I	N	G		A	L	P
			E			L		T	U	R	K		F	E
	S	T	E	L		M				I	L	O		T
S	E	R				O	B	E		M	E	N	C	I
P	S	E	Ŭ	D	O	N	I	M		A	R	D		N
E				E			K			C				T
C		K	U	V		S	I	N	D	O	N	E	M	A
I	R	O	N	I		I	N	A				J	U	N
F		L	I	G		Z				G	R	O	S	
I	R		K	A	N	T		T		A				
K	A	F		S	O	I	F	U		S	T	A	M	P
A	R	E	O		K	L	A	K		T	O	L	E	R
N	A	R	K	O	T	I	L	O		U	L	I	S	O

Ĉu vi bone sukcesis?

— Refoje, dankon al Don Reble.

Artikoloj

OKEMO TRANSLOKIĜU AL KANADO

Mi naskiĝis en Cornwall, en Ontario, unu kilometron for de Usono, kaj ofte estis en tiu lando. Sed nun mi neniam plu volas iri al Usono. Mi timas Usonon; mi timas esti en Usono. Usono nun estas tia lando kie oni povas esti en malliberejo dum jaroj, sen akuzo, sen la rajto paroli kun advokato, kaj sen la rajto vidi diplomatian reprezentanton se oni estas eksterlandano.

Mi pensas pri Maher Arar, el Otavo, mia urbo. Li vojaĝis de Tunizio al Montrealo. Li havis sian kanadan pasporton. Malbonŝance li transitis la flug-havenon Kennedy, en Nov-Jorko. Usono kaptis lin kaj eljetis lin en Sirion, tiu sama lando kiun ĝi nun nomas "bandita lando" kaj "terorisma ŝtato". Almenaŭ oni pensas ke tiel okazis, ĉar Usono ne volas diri kie li nun estas. Oni ne plu havas novaĵojn de li. Amnistio Internacio nun konsideras ke li estas inter tiaj homoj pri kiuj policistoj interesiĝis kaj kiuj poste "malaperis". Mi pensas ankaŭ pri Liban Hussein, ankaŭ el Otavo. Dufoje tage mi veturas antaŭ lia vendejo, kiu situas survoje al mia laborejo. Laŭ peto de Usono, Kanado akuzis lin pri tio, ke li kolektis kaj donis monon por terorismaj celoj. Post \$ 150 000 da advokataj kostoj, juĝisto decidis ke estis absolute neniu pruvo pri tio. Almenaŭ li rajtis al decido de juĝisto.



Usono ne plu volas agnoski la Konvenciojn de Ĝenevo. Ĝi eĉ ne plu volas agnoski siajn proprajn leĝojn kaj malliberigas homojn eksterlande por eviti ilin. La kontaktoj inter la kanada kaj la usona movadoj estas surprize maloftaj. Normand Fleury el Montrealo havis vere bonan ideon kiam li sugestis, antaŭ deko da jaroj, ke okazu komunaj renkontiĝoj en Okemo, en Vermonto. La loko estas konvena por Esperantistoj el Nov-Jorko, Montrealo, Otavo, kaj aliaj lokoj. Krome Normando zorge elektis daton kiu konvenas al Kanadanoj kaj Usonanoj, ĉar ĝi okazas dum longa semajnfino en ambaŭ landoj - la dank-festa semajnfino ĉe ni, kaj la Kolombo-festo en Usono. Mi iris al Okemo kaj

ĝuis la renkontiĝon, kaj mi rekomendis al aliaj homoj ke ili ankaŭ ĉeestu ĝin.

Sed mi ne plu volas iri al Okemo, kaj mi ankaŭ ne plu povas varbi al aliaj esperantistoj ke ili iru tien. Kiel mi povas diri al samideano kaj samŝtatano ke li iru al Usono, sciante ke tiu lando tute malkaŝe diskriminacias kontraŭ li pro la loko kie li hazarde naskiĝis? Kiel mi povas inviti al Esperantisto kiu hazarde naskiĝis en Libano aŭ Egipto ke li iru al Usono, sciante ke homoj kiel li tuj iris en malliberejon kiam ili provis obei al usona leĝo kaj registriĝi ĉe policejo?

La komuna kanada-usona renkontiĝo ne plu povas okazi en Okemo. Venis la tempo ke ĝi translokiĝu al la alia el la partneraj landoj.

Yves Bellefeuille

PRI GESTUNO / ISL

Al multaj el vi okazis verŝajne almenaŭ unufoje vidi la jenan scenon: duopoj aŭ grupetoj de silentaj homoj kunsidas, kaj laŭvice turnosvingas siajn brakojn je mirinda rapideco, akompanante la turnosvingadon per viglaj esprimoj de sia kvazaŭ guma visaĝo, kaj tiel kaŭzante jen la ridon, jen la surprizon, jen la aprobon de la aliaj silentuloj. Kompreneble temas pri silenta konversacio. Por la skribanto la unuan fojon ke tio okazis estis mirinda kaj kvazaŭ kortuŝa spektaklo. Nu, tiuj silentuloj estas surduloj, kaj sia turnosvingado de brakoj estas signolingvo, la ilo de surduloj por komuniki inter si.

Signolingvoj estas stimula temo por Esperantistoj, pro almenaŭ tri kialoj. Unue, ĉar la signolingvoj estas ne tro konata, sed evidenta ekzemplo de lingva subpremado. Dum longa tempo oni malebligis al la surduloj uzi ilian naturan komunikilon. Ili estis konsiderataj handikapuloj, kaj tial devigataj lerni per grandegaj streĉoj la parolatajn lingvojn. Due, ĉar la ekzisto de neparolataj lingvoj devigas la Esperantistojn rekonsideri la koncepton de universala lingvo taŭga por komunikado inter ĉiuj homoj. Trie, ĉar inter la komunumoj de surduloj sin prezentas denove la problemo de la komunikado inter uzantoj de malsamaj signolingvoj.


Per ĉi tiu artikoleto, ni celas mallonge enkonduki la signolingvojn, kaj klarigi kiel la problemo de interlingva komunikado estas adresata inter la surduloj. Ni finos per kelkaj rimarkoj pri signolingvoj el Esperantista vidpunkto, esperante ke tio estos interesa temo por sekvanta diskuto inter ni.

KIO ESTAS SIGNOLINGVOJ?

Eble estos pli facile respondi al tiu ĉi demando klarigante unue kio NE estas signolingvoj. Signolingvo ne estas pantomimo, per kiu esprimkapabla aktoro "montras" memkompreneblan historion per siaj manoj kaj vizaĝo. Signolingvo ne estas permana literumado (aŭ almenaŭ ĝi ne estas nur tio; eblas permane literumi en signolingvoj, sed tio oni faras nur sporade, ekzemple por prezenti proprajn nomojn, same kiel en la ĉina aŭ la japana oni skribas okcidentajn nomojn per la latina alfabeto). Signolingvo eĉ ne estas klopodo reprodukti parolatan lingvon (ekzemple la anglan) per manoj. Do, kio estas signolingvoj?

Simple, signolingvoj estas lingvoj, same kiel la angla, la franca, la hispana, ktp. La diferenco estas ke en la signolingvoj oni uzas la manojn anstataŭ la voĉon por sin esprimi, sed krom tio, ili same funkcias. En signolingvoj, same kiel en parolataj lingvoj, estas vortoj, kiujn oni kunmetas por krei frazojn, kaj tiuj frazoj havas signifon. Same ol en parolataj lingvoj, la kunmetado de vortoj obeas specifajn gramatikajn regulojn. Signolingvoj havas morfologion, sintakson kaj semantikon same kiel parolataj lingvoj. Ekzemple, en la angla vortoj kiel "play", "player" and "playground" kompreneble estas morfologie interrilataj, same kiel "ludo", "ludisto" kaj "ludejo" en Esperanto; tute simile, en la amerika signolingvo estas tri korespondaj signoj evidente rilataj, sed iomete malsamaj, por tiuj tri konceptoj. Jen alia ekzemplo pri sintakso: en la anglaj frazoj "you are happy" and "are you happy?", la vortordo ebligas distingi deklaron de demando. Saman funkcion havas la vorteto "ĉu" en Esperanto. Simile, en la amerika signolingvo, la sama sinsekvo de signoj estas uzata por deklaro kaj demando, sed la dua estas akompanata de specifa vizaĝesprimo. Nuntempe ekzistas riĉa lingvistika literaturo pri signolingvoj, kiu eksploras tiujn lingvojn laŭ la samaj lingvistikaj

principoj uzataj por la parolataj lingvoj. Plezura enkonduka legado por ĉiunivelaj legantoj estas la libro de Oliver Sacks, *Seeing voices*. Pli teknikaj lingvistikaj libroj estas ekzemple *American Sign Language Syntax*, de Scott K. Liddell, aŭ *American Sign Language. Linguistic and Applied Dimensions*, de Ronnie B. Wilbur. Se oni volas atingi pliajn informojn per interreto, bona komenca punkto estas <http://library.gallaudet.edu>, la hejmpaĝo de la biblioteko de la universitato Gallaudet, specifa amerika universitato por surduloj. En 1988 tiu universitato estis teatro de akra batalo, dum kiu la surdaj studentoj, je la voko (aŭ pli precize, je la signo) "Surdula Povo", postulis ke la prezidanto de la universitato estu surdulo. Ili venkis. La ĵus enoficigita surda prezidanto tuj renkontis la reprezentanton de la studentoj. Post la renkontiĝo, la studento eliris la ĉambron kaj diris kun larmoj en siaj okuloj: "Ne ĉeestis interpretanto". Kompreneble, oni ne plu bezonis tian.



LA INTERNACIA SIGNOLINGVO

Ofte okazas ke kiu aŭdas unufoje pri signolingvoj surpriziĝas eksciante ke estas pluraj signolingvoj. Ial oni tendencas supozi ke estas nur unu signolingvo, kvankam neniu same supozus pri parolataj lingvoj. Eble estas psikologia klarigo pri tio. Por ni aŭdkapabluloj, signoj estas la lasta rimedo kiun ni uzas por komuniki kun fremduloj, kiam ni havas neniun komunan lingvon por interkomuniki. Post kelkaj malfacilaĵoj, ni kutime sukcesas tiamaniere interŝanĝi simplajn informojn. Tial eble ni surpriziĝas ke, se ni sukcesas uzi signojn kiel 'universala' komunikilo, surduloj, por kiuj signoj estas la ĉefa komunikilo, havas kontraŭe multajn malsamajn signolingvojn. Tamen, la signolingvoj ne konsistas en nuraj bildaj signoj, sed, kiel klarigite supre, ili estas simbolsistemoj, lingvoj. Temas pri diferenco simila al tiu, kiu estas inter desegnetoj kiujn ni povus fari por esti komprenataj de fremduloj, kaj ideogramaj sistemoj, kiel la ĉina lingvo.

Fakte, la fragmentigo de la signolingvoj estas eĉ pli rimarkinda ol tiu de la parolataj lingvoj. Tio okazas ĉar kompreneble la signolingvoj ne havas skribitan formon, tial ili tendencas fariĝi lokaj dialektoj, ne nur laŭ la landoj, sed ankaŭ laŭ la urboj, kaj eĉ laŭ la institutoj kie la surduloj lernas. Krom tio, alia verŝajne surpriziga afero estas ke la geografio de signolingvoj estas ofte rimarkinde malsama ol la geografio de la parolataj lingvoj. Ekzemple en Norda Ameriko kaj Britio oni parolas malsamajn lingvojn (la Amerika SignoLingvo, ASL, kaj la Brita SignoLingvo, BSL). Kaj, eĉ pli rimarkinde, la Amerika SignoLingvo estas multe pli simila al la Franca SignoLingvo ol al la Brita. Tio okazis pro historia kialo, ĉar la ĉefa instruisto en la unua lernejo por surduloj en Norda Ameriko, fondita en 1817, estis franco specife vokita el Parizo, Laurent Clerc. Parenteze, la fondinto de la lernejo estis tiu Thomas H. Gallaudet, al kiu la supre menciita universitato por surduloj estas dediĉita.

Do, kiel aliras la surduloj la problemon de komuniko inter malsamlingvanoj? Spontane, en maniero simila al tiu supre priskribita pri la aŭdkapabluloj. Ili 'suspendas' la uzon de sian propran signolingvon, kaj uzas gestojn, mimadojn, bildajn signojn. Kompreneble, en tiu aktivado ili estas pli efikaj ol aŭdkapabluloj. De tiu spontana komunikmaniero, naskiĝis iom post iom aro de internaciaj gestoj, kiu tamen oni ankoraŭ ne povus difini kiel 'lingvo'.

Krom tiu spontana disvolviĝo, dum kelkaj jardekoj okazas ankaŭ intenca agado por planita solvo de la problemo, per standardigo de internaciaj gestoj, kaj unuigo de la signolingvoj. Tiu temo diskutiĝis en 1951 en kongreso de la Tutmonda Federacio de la Surduloj ('World Federation of the Deaf') en Romo, Italio. Tiuokaze oni decidis kunmeti 'Vortaron de Gestoj por Internaciaj Konferencoj'. En 1961 oni aldonis unuan volumon de 339 signoj, kun franca kaj angla glosaro. Post pliaj dek jaroj, en 1971, dua volumo kun pliaj 300 signoj aperis. Finfine, en 1975 oni aldonis libron en kiu proksimume 1500 signoj estis difinitaj, kaj la internacia lingvo eĉ ricevis nomon, Gestuno (*Gestuno: International Sign language of the Deaf*, British Deaf Association, Carlisle, 1975). Lastatempe aperis nova eldono kiu inkluzivas ankaŭ araban glosaron (vidu <http://www.safat.com/pwsn/gestuno.html> por pliaj informoj pri ĉi tiu eldono).

Gestuno estas por surduloj tio, kio Esperanto estas por aŭdkapabluloj. Ĝiaj signoj estis elektitaj kaj adaptitaj el ekzistantaj signolingvoj. La kriterio por elekti signojn estas ke ĝi estu facile komprenebla al tiom multaj signantoj kiom eblas. Gestuno estas uzata de partoprenantoj al internaciaj kunvenoj, konferencoj, k.t.p., precipe de surdaj funkciuloj, sed ankaŭ de ordinaraj surduloj. Nuntempe oni tendencas anstataŭi la nomon Gestuno per la nomo 'International Sign Language' (ISL).

Por atingi pliajn informojn pri la Internacia Signolingvo oni povas konsulti la subajn fontojn, el kiuj la plej parto de la supraj informoj estas prenita. En la *Unesco Courier* de Marto 1974 aperis la artikolo 'Towards an International Language of Gestures', de Cesare Magarotto. En la *Gallaudet Encyclopedia of Deaf People and Deafness*, McGraw Hill, 1987, redaktita de John V. Van Cleve, oni povas konsulti la kapvorton 'International Gestures', verkita de Bill Moody. Ĝi ankaŭ enhavas sekcion pri Gestuno. Ni parenteze atentigas pri neoportuna rimarko ĉe la fino de la artikolo: 'La internaciaj gestoj estas gravaj pro pluraj kialoj. Ili evoluiĝis nature inter surduloj sen la arbitra invento de pseŭdolingvo kiel Esperanto...'. Pri ISL oni povas konsulti la retpaĝon <http://www.handspeak.com/isl>. Ĝi ankaŭ enhavas vortaron de signoj de la internacia lingvo, klare montritaj per animigitaj imagoj. Tiu vortaro estas parto de pli ĝenerala vortaro de signolingvoj, atingebla ĉe <http://www.handspeak.com>.

SIGNOLINGVOJ KAJ ESPERANTO

Do, kial gravas la signolingvoj, ĝenerale, kaj la internacia signolingvo specife por Esperanta movado? La plej memkomprenebla rilato estas ke la movadoj por Esperanto kaj por internacia signolingvo havas similajn celojn en malsamaj lingvaj kaj kulturaj kadroj, do estas nature ke oni serĉas aliancon kaj kunlaboron. Tutcerte temas pri malsamaj kunteksto, kaj oni devus konsideri la kulturajn diferencojn inter ili. Ekzemple, en la surdula komunumo estas pli forta baza solidareco, kompreneble pro la situacio de tiu komunumo en la tuta socio; tial la problemo de internacia lingvo estas eble malpli ŝarĝita de idealaj kaj politikaj signifoj. Tamen estas klare ke la du movadoj havas komunajn valorojn.

Sed krom tio, se oni permesas al ni enkonduki subjektivajn vidpunktojn por diskuto, signolingvoj gravas al Esperantistoj ankaŭ por aliaj, pli bazaj kialoj. Kompreneble, la ekzisto de signolingvoj reprezentas defio al la konceptoj de universaleco kaj neŭtraleco kiel realigitaj en Esperanto. Ĉu Esperanto estas ankoraŭ tiom universala kaj neutrala, se oni konsideras ankaŭ la surdulojn? Ĉu eblas vere universala lingvo kiu ebligas ne nur komunikon inter parolantoj de malsamaj lingvoj, sed ankaŭ inter aŭdkapabluloj kaj surduloj, kaj pli ĝenerale

inter uzantoj de malsamaj komunikistemoj? Aŭ ĉu ni devas kontentiĝi per paralelaj internaciaj lingvoj (por parolantoj, por signantoj, k.t.p.), sen alfronti la temon de komuniko inter tiuj komunumoj? Ekzemple, oni povus aserti ke signolingvoj estas pli universalaj ol parolataj lingvoj, ĉar aŭdkapabluloj povus uzi signolingvojn, dum la kontraŭo estus problema afero. Aliflanke, oni povus repliki ke parolataj lingvoj, en sia skribita formo, estas tute uzeblaj de surduloj.

Krom tiuspecaj temoj, kiuj tutcerte ne estus facile solveblaj, kaj eble estus iom tro abstraktaj kaj akademias por esti fruktodonaj, gravas la sinteno kiun havas la Esperantistoj rilate al la surdula komunumo kaj al la signolingvoj. Krom la specifaj solvoj kiujn oni proponas, gravas ke la Esperantistoj estu malfermaj, kaj montru scivolon kunlabori kaj ĵeti pontojn inter la du komunumoj. Tio montrus per praktika kaj konkreta situacio ke, krom la specifa lingvo kiun ni ŝatas kaj subtenas, estas pli fundamenta animo de nia movado, kaj tiu estas la solidareco, kaj la firma volo solvi problemojn per kunlaboro, anstataŭ ol per konkursado kaj subpremado.

Davide Turcato (turk@sfu.ca)

ANTIKVA FILIPINA RELIGIO

Tra la 9a al 15a jarcentoj, per Arabaj komercistoj kaj misiistoj, la religio Islama disvastiĝis en la insularo filipina. La plej forta influo estis en Mindanao, la plej suda regiono. Kiam venis la hispanoj katolikaj en la 16a jarcento, la islama influo en la plej norda regiono, Luzono, estis embria; nur familioj elitaj konvertiĝis al islamo, religio monoteista. Pli parte da la indiĝenoj en la tagaloga regiono de Luzono ankoraŭ adoris la pli malnovan religion politeistan. En ilia religio, la plej forta dio estis Abba aŭ Bathala, la kreanto de ĉio; tiu ĉi dio vivis en la tre malproksima loko de spaco eterna, kiu nomiĝis Kaluwalhatian. Ĝis nun, oni aŭdas de la tagalogoj, 'Bahala na', kiu signifas, ke se io ajn okazas, la dio regas. Bathala estis la protektanto kaj nutranto de homoj. Ekzistis aliaj dioj: Indianale, la dio de la laboro kaj la bonaj agoj; Dimangan, la dio de la bona rikolto; Amanikabli, la dio de la maro; Mayaari, la protektanto de la Luno; Hana, la dio de la mateno; Tala, la dio de la steloj; Ikapati, la dio de la lando kaj la agrikulturo; Mapulon, la dio de la sezonoj; Apolaki, la protektanto de la Suno; kaj Diam Masalanta, la dio de la amantoj. La tagalogoj kredis en la vivo post la morto. La animoj de la bonaj homoj iris al Maca, la paco eterna. La animoj de la malbonaj iris al Kasanaan, la malpaco eterna, kiun la dio, Sitan, gardis. Sitan havis helpantojn diajn: Mangangaway, la dio de la malsanoj; Manisilat, la dio de rompitaĵoj; Mankukulam, la dio de la fajro; kaj Huklaban, la forta diino metamorfa. Aliaj triboj filipinaj havis siajn proprajn diojn.

Fonto: Jocano, F. Landa. *Philippine Prehistory*. Sta. Ana, Manilo, Filipinoj: Community Publishers, Inc., 1975.

Victor Medrano

Internaciaj novaĵoj

LINGVAJ EKZAMENOJ EN HUNGARIO
ĈU ESPERANTO ESTAS TRO SUKCESA?

De la jaro 1995 estiĝis interesa fenomeno en Hungario pro la apero de leĝo pri la deviga ekzameno pri fremdaj lingvoj en altlernejoj kaj universitatoj. 'Ekde tiu tempo aprubte ekkreskis la nomdo de tiuj gestudentoj kiuj trapasas ŝtatan lingvoekzamenon,' klarigas Oszkar Princz, kunordiganto de esperanto-lingvoekzamenoj ene de la Fremdlingva Pluperfektiga Centro (FPC). Nun oni povas akiri la diplomon nur en unu instituto, kaj en ties filioj dise en la lando, en Idegennyelvi Továbbképzési Központ, kiu akreditis la esperantan lingvoekzamenan sistemon.

En Hungario ankoraŭ ne estas postulo, kiel priakcepta kondiĉo aliĝi al altlernejoj aŭ universitatoj, koni iujn ajn fremdajn lingvojn. 'Por ricevi diplomon en altlernejoj aŭ universitatoj,' diras Oszkar Princz, 'oni devas plenumi tri kondiĉojn: akiri certajn studunuojn, verki diplomlaboraĵon kaj prezenti dokumenton pri la kono de unu-du fremdaj lingvoj.' Feliĉe en Hungario jam de la sesdekaj jaroj aperis pluraj decidoj de la registaro-kabineto, laŭ kiuj Esperanto estas egalrajte instruebla same kiel aliaj fremdaj lingvoj. 'Sekve kiam aperis la leĝo pri la lingvoekzamenoj, oni rajtis elekti ankaŭ la esperantan lingvon. La kialoj estas konataj: oni bezonas malpli da tempo, peno kaj mono por akiri la diplomon pri ŝtata lingvoekzameno pri esperanta lingvo.' La plimulto de gestudentoj dum la lastaj jaroj trapasas ŝtatan lingvoekzamenon pri la lingvoj angla, germana, franca. En la jaro 2002 sur la popularecolisto la trian lokon okupis Esperanto, forpuŝante de la tria loko la francan.

Princz volas eksporti la spertojn de hungaraj esperantistoj. 'Se oni metus Esperanton sur la liston de elekteblaj lingvoj kiel en Hungario, la homoj elektus la lingvon de Zamenhof, en tiaj kazoj, kiam en iuj formoj de lernejoj oni postulas de ili atestilon-diplomon, ekzamenon pri lingvokono. Sekve esperantistoj postulu nur ke Esperanto estu libere elektebla en ĉiuj niveloj de la lernado, sed ni ne devas postuli la devigan instruadon de Esperanto.'

La sukceso de Esperanto en hungaraj lernejoj estas tiom granda dum la pasintaj sep jaroj ke kelkaj politikistoj kaj edukistoj komencas grumbli. En aŭtuno edukadkomisiono de la hungara parlamento denove konsideros la elekteblajn lingvojn kaj kelkaj timas la forstrekon de Esperanto el la listo.

Dum la pasintaj 7 jaroj al la ŝtata lingvoekzameno aliĝis entute 6484 personoj laŭ la subaj kategorioj:

	Baza	Meza	Supera	Sume		Baza	Meza	Supera	Sume
1995	8	576	18	602	1999	113	462	8	583
1996	25	485	11	521	2000	168	1455	4	627
1997	29	512	4	545	2001	295	1721	26	2042
1998	50	509	5	564	2002	1000	5877	210	7087
					Sume:	1688	11597	286	13571

Por pli da informoj bv. kontakti Oszkar Princz, kunordiganto de esperanto-lingvoekzamenoj ene de la Fremdlingva Pluperfektiga Centro <princz.oszkar@chello.hu>
Komunikad-centro

GOTENBURGO: VIRTUALA UK KAJ ALTA PROTEKTANTO

La Sveda LKK zorgas ankaŭ por la esperantistoj, kiuj ne sukcesos veni al Gotenburgo. Ĉe speciale lanĉita nova retejo <www.uk-2003.net> dum la daŭro de la tuta kongreso funkcios 'Virtuala kongresejo de la 88-a UK'.

En la retejo eblos konatiĝi kun Gotenburgo, la Kongresejo, legi la informojn, kiujn prezentas la Kongresa Kuriero, ofte eĉ pli frue ol en la presita Kuriero. I.a. oni planas regule aperigi la nombrojn de la aliĝintaj kongresanoj. Aperos skizoj pri la programo, foje oni povos ankaŭ aŭdi fragmentojn de iuj prelegoj, vidi la fotojn. La vizitantoj de la retejo povos sendi mesaĝojn al la kongresanoj, uzante la kongresan numeron kiel la adreson - tiu letero estos liverita surpapere pere de la kongresa Mesaĝotabulo. Funkcios ankaŭ propra diskutejo pri "Kongresa temo" en kiu la retaj partoprenantoj de la Virtuala UK povos kundiskuti pri lingvaj rajtoj kaj respondecoj.

Cetere, la sveda ĉefministro Goran Persson akceptis esti Honora protektanto de la 88-a Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo.

GK de UEA

OFICIALAJ INFORMOJ DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO, N-RO 15

Pri la vortoj KOREO kaj EGIPTO

En 1988 la Akademio de Esperanto faris decidojn pri la vortoj KOREO kaj EGIPTO. Tiuj decidoj estis unue publikigitaj en *La Letero de l' Akademio*, n-ro 7, Aprilo-Majo-Junio 1989, paĝoj 2 k. skv., kaj poste en la *Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto*, No 11, *Aktoj de la Akademio III*, 1975-1991, paĝoj 61-63.

La Akademio tiam deklaris i.a. jene:

La formo Koreujo estas kontraŭfundamenta. La sola formo, kiu obeas la Fundamenton estas la Koreo kaj ties anoj estas Koreanoj. La sola formo, kiu obeas la Fundamenton estas la landnomo Egipto; ties anoj estas Egiptanoj. La Akademio tiam referencis al la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko kaj al la 2-a Rekomendo pri landnomoj (*Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto*, n-ro 4, *Aktoj de la Akademio III*, paĝo 49), kiu tekstas jene: En okazo de konflikto inter du au pluraj formoj por unu sama landnomo au ankaŭ inter la uzo de kategorio aŭ la alia por unu sama radiko, la Akademio rekomendas preferila plej internacian landnomon kaj tiel obei al la 15-a Regulo de la Fundamento.

Gramatiko pritraktas, kiel 'fremdaj' (internaciaj) vortoj kompletigu la vortoprovizon de Esperanto. La Akademio ankaŭ konstatas, ke per si mem tiu regulo ne determinas, kiu ano de internacia vortofamilio fariĝu baza en Esperanto, kaj kiun el la internaciaj signifoj ĝi havu. Tial uzado de la vortoj KOREO kaj EGIPTO kun genta au landana signifo ne malobeas la 15-an regulon, same kiel tia uzado de ekzemple la vortoj ĈINO, JAPANO kaj PORTUGALO tiun regulon ne malobeas, malgrau la fakto ke por ĉiu el ili la internacie plej ofta signifo estas landa.

Sekve la Akademio de Esperanto nun deklaras, ke neniu el la landnomoj Koreo, Koreujo, Koreio; Egipto, Egiptujo, Egiptio malobeas al la reguloj de la Fundamento de Esperanto. Per tio la Akademio nuligas siajn antaŭajn decidojn el 1988 pri la vortoj KOREO kaj EGIPTO.

La Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro, Bertilo WENNERGREN
La Prezidanto de la Akademio, Prof. Geraldo MATTOS

La ĉi-antaŭa nova decido pri KOREO kaj EGIPTO konsistigas ŝanĝon de pli fruaj decidoj de la Akademio. En tiaj okazoj la Statuto de la Akademio postulas aprobon de almenaŭ du trionoj de ĉiuj membroj. La nova decido estis aprobita en marto 2003 per 30 jesaj voĉoj (kun 2 neoj kaj 1 sindeteno). La nombro de la Akademianoj estis tiam 44. La plena teksto de la nova decido estas konsultebla en la TTT-ejo de la Akademio de Esperanto: <http://www.akademio-de.Esperanto.org/decidoj/landnomoj/koreo_egipto.php>

Renato Corsetti

JUNAAMIKO.INF.HU

La revuo por lernejoj kaj komencantoj havas tiun novan, pli klaran hejmpaĝan adreson. La unua paĝo prezentas bazajn informojn pri la gazeto. La dua paĝo montras la enhavon de la plej freŝa numero, kune kun du au tri eroj plene legeblaj. Kviza paĝo estas la tria. En ĉiu numero de la revuo estas prezentitaj kvizaj demandoj pri kiuj legantoj konkuras en tri aĝgrupoj. En la paĝo oni vidas la nunajn demandojn, respondojn al la antaŭaj, liston de gajnintoj kaj la regularon. La kvara paĝo prezentas la redakcion kaj la kunlaborantojn, troviĝantaj en dudeko da landoj. Vortlisto de la uzataj 1500 radikoj estas ĉiam konsultebla en la kvina paĝo. Elŝuteblaj estas du-lingvaj listoj por la angla, finna kaj sveda. La redaktoro bonvenigas ofertojn pretigi la liston en aliaj lingvoj. Aldone aperas gramatika resumo, kun la finaĵoj, prepozicioj kaj afiksoj de Esperanto. Antaŭfine troveblas la (ret)adreso de perantoj kaj la abonprezoj (la plena tarifo estas 12 EUR por kvar 28-paĝaj numeroj). La lasta paĝo titoliĝas Solidareco. Tie legeblas en tabelo junuloj, grupoj au centroj en landoj kie oni volas lerni kaj uzi la lingvon, sed ne havas rimedojn aboni revuojn. Ni tie invitas vin elekti iun el la listo kaj pagi por tiu patronan abonon. Vi estas bonvena gasto al tiu hejmpaĝo!

Stefan MacGill, Eldonado, ILEI

LERNO-KOMPLETO DE ILEI

Nia instruista ligo pretigas lernilojn precipe por pli junaj lernantoj kaj koncentras la atenton al studiloj uzeblaj internacie, alivorte, en kiuj aperas nur Esperanto. Ili estas preparitaj laŭ la ideoj de komunika instruado, nome ke la baza lingva unuo estas la frazo, kaj oni de la komenco uzas la lingvon aktive por dialogi, komunikante ideojn kaj nociojn.

Por komencantoj, la propono estas Okuloj, 44-paĝa kolore ilustrita kajero, pretigita por infanoj inter 6- kaj 10-jaraj. Ĝi prezentas 440 radikojn, el kiuj pli ol kvardek estas verboj - la motoroj de la frazoj. Ili aperas en adekvataj kunteksto, tiel ke lernantoj tuj dekomence scias ne nur la verbon sed ankaŭ la uz-manon - kun au sen rekta objekto. Aperis ankaŭ Okulo Gvidilo por la instruisto au kursgvidanto. Ĝi resumas por ĉiu paĝo de la studenta kajero la novajn vortojn, gramatikaĵon, komunikajn lertojn, kaj krome prezentas praktikajn konsilojn kiel prezenti la paĝon kaj kiujn pliajn agadojn au ludojn oni povas uzi. La dua parto de la gvidilo prezentas fotokopipretajn ekzercojn, tiel ke instruisto povas mem tre facile pretigi task-foliojn por la klasanoj, ŝparante la tempon mem krei ilin.

Por daurigi la kursojn ekde la fino de la studado de "Okulo", ni proponas kajerojn du kaj tri de la serio Tendaraĵ tagoj. Tiu transiro eblas, ĉar Okulo kovras la saman vort-trezoron kaj gramatikon kiel la unua kajero de Tendaraĵ Tagoj, kiu ne plu estas havebla de ILEI (sed eble restas ĉe iuj libroservoj). La dua kajero estas unuavice destinita por lernantoj inter 10- kaj 16-jaraj; gvidila materialo por ĝiaj komencaj paĝoj estas troveblaj en la hejmpaĝo de ILEI. La tria kajero de Tendaraĵ tagoj konvenas por ĉiuj lernantoj pli ol 10-jaraj, ĝi estas uzebla eĉ por kursoj de la supera nivelo. Kiel aldona helpilo ni proponas grandformatan kantlibron de norvega kolego. Oni povas trovi pliajn informojn pri ĉi tiuj verkoj en la hejmpaĝo <http://www.edukado.net>.

Okulo, kajero 1, 44p, ilustrita de Monika Molnar. EUR 4,50.

Okulo, Gvidilo por kajero 1, ilustrita de Monika Molnar. EUR 4,50.

Tendaraĵ tagoj, kajero 2, 72p. ilustrita de Pavel Rak, EUR 6,90.



Tendaraĵ tagoj, kajero 3, 76p. ilustrita de Pavel Rak, EUR 6,90.

Fantaziaĵoj kaj kantoj por infanoj, Jon Rommesmo, 100p. EUR 3,60.

Mendeblaj de la libroservo de UEA (triona rabato ekde 3 ekzempleroj por *Tendaraĵ tagoj*, ĉiuj titoloj plus sendokostoj).

Mendeblaj de ILEI (Poŝte: Pannonia u. 30 I 6, HU-1136 Budapest. Rete: stefan.macgill@galamb.net), triona rabato por ĉiuj verkoj ekde 3 ekzempleroj de ajna titolo, sendokostoj inkluzivitaj.

S. MacGill



NOAM CHOMSKY: "ESPERANTO NE ESTAS LINGVO"

Ĉu Esperanto havas generativan gramatikon? Al ĉi tiu demando respondas negative unu el la plej famaj lingvistoj en la mondo Noam Chomsky. 'Esperanto ne estas lingvo, sed vortaro kaj sugesto pri gramatiko. Homoj komprenas ĝin ĉar ili uzas siajn proprajn intuiciajn sciojn. Do, al la demando ne eblas respondi,' skribas la profesoro de lingvistiko ĉe MIT-universitato al Eric Benech. 'Mi ne scias, kion respondi al Noam Chomsky. Mi ankaŭ ne sufiĉe bone regas la usonan,' konsterniĝas Benech, franca esperantisto kiu ĉiam legas la librojn de Chomsky kun granda intereso. La 72-jaraĝa Chomsky estas ankaŭ unu el la plej konataj politikaj disidentoj en Usono.

Ĉu gravas se la plej grava lingvisto en la mondo opinias ke Esperanto ne estas lingvo? Kaj kio cetere estas tiu generativa gramatiko, kiu laŭ opinio de Chomsky tiom mankas al Esperanto? Zlatko Tišljarić, direktoro de la internacia asocio Inter-Kulturo, klarigas: 'La homoj havas en si enkonstruitan generativan gramatikon, t.e. genetikan planon kiel konstrui lingvon. Mallonge dirite, temas pri sinsekvo de frazoj kiuj konsistas el materia (substantiva) kaj nemateria (verba) komplekso, kiuj disdividiĝas laŭfunkcie je ĉiam pli etaj detaloj, proksimume laŭ la sistemo de transformaciaj reguloj de Chomsky. Sed por reale konstrui la lingvon oni uzas arbitre elektitajn materialojn - la vortojn. La gramatiko estas generativa, la leksiko estas arbitra, hazarda kaj elektebla.'

'Lingvoj uzataj de homoj - eĉ se nur du - por komuniki kaj signi identecon de grupo estas homaj lingvoj senkonsidere pri tio kiam kaj kie ili ekestis. Lingvoj estas mallongdaŭraj provizoraj lingvoj inter eta infano kaj patrino same kiel piĝinaj lingvoj aŭ kiel lingvoj iniciatitaj de unu homo aŭ fakula grupo, se ilin akceptas kaj uzas homaj grupoj,' opinias Tišljarić. 'Sendube la plej granda homa lingvo kreita en 'laboratorio' kaj normale uzata estas la bahasa indonesia kun 200 milionoj da uzantoj. Tiu ĉi traktaĵo estas skribita en Esperanto, lingvo kiun Noam Chomsky proklamas neekzistanta.'

'Kian opinion havas Chomsky pri la imperiismo de la angla, la lingvo 'politike korekta' ? Ĉu li opinias tion normala?' diras Henri Masson, redaktanto de la gazetara kaj rebata servo de SAT-Amikaro kaj prezidanto de la asocio 'Espéranto-Vendée'. Masson ne scias sub kiu kategorio pritrakti la aferon, ĉu lingvistike, ĉu ideologie? 'Prefere ol havigi al li opinion, eble valorus fari al li demandojn, kiuj devigus lin pripensi, nedevice rekte pri Esperanto, kaj sen rimarkebla signo pri nia esperantisteco. La problemo estas, ke tro rekta pritrakto de Esperanto riskas puŝi lin formuli, eĉ eble publike aŭ skribe, pliajn senfundamentajn asertojn pri Esperanto kaj enprofundiĝi en la eraron.'

Marko Naoki Lins de la Komunikadcentro timas, ke koleraĵoj de 'verdaj finvenkistoj' malhelpas al la plibonigo de la publika bildo de Esperanto kaj esperantistoj. 'Mi komprenas la konsterniĝon, sed vere ne indas krei novan malamikon de Esperanto. Se vi respondas, bonvole altnivele kaj tre afable respondi al profesoro Chomsky. Nepre ne sendu koleraĵojn.'

Legu pli pri Noam Chomsky: <http://www.zmag.org/chomsky/index.cfm>
Reagu afable kaj altnivele al: <chomsky@MIT.EDU>

Komunikad-centro

ESPERANTO FABELKONKURSO: OSMO BULLER ALVOKAS

'Temas pri uzo de Esperanto lige kun fabelkonkurso, kiun mia instituto organizas ekde 1993 kaj kiu fariĝis la plej konata kaj prestiĝa en sia speco en Finnlando. Tio donas publikecon al Esperanto ĉe la finna publiko,' klarigas Osmo Buller, direktoro de la Pääntalo-instituto, kultura-literatura centro en Taivalkoski.

Laŭ Buller Esperanto profitas de la konkurso senpage. 'Kiel esperantisto mi ĝojas pri la ebleco tiel kontribui al nia afero en mia ekstermovada profesio, sed kiel direktoro de la instituto mi demandas min, ĉu valoras dediĉi tempon kaj monon por ĉio tio nur pro dekelko da konkursaĵoj. Informado pri Esperanto ja ne estas tasko de mia instituto,' cerbumas Buller por tuj trankviligi: 'Tamen la esperantisto en mi denove venkis la direktoron kaj almenaŭ ĉi-jare Esperanto restas lingvo de la konkurso. Ĉu tiel estos poste, tion unuavice decidus la aktiveco de esperantistoj por diskonigi la konkurson kaj varbi konkursaĵojn, kaj nur duavice mi.'

La Pääntalo-instituto invitas regule al fabelkonkurso por finnaj infanoj ĉiujare ekde 1993, la plej prestiĝa tia konkurso en Finnlando. En 2000 la instituto aldonis al la konkurso Esperanton. Ankaŭ ĉi-jare la instituto invitas konkursi en Esperanto. 'Estas tri kategorioj: infanoj ĝis 9-jaraj; 10-11-jaraj kaj 12-13-jaraj. La konkursaĵoj estu verkitaj originale en Esperanto de individuaj infanoj aŭ de grupoj (ekz. lernejoj klasoj) kaj individuaj kaj grupaj konkursaĵoj estos taksitaj aparte,' detaligas Buller. 'En la prijuĝado oni aprezas antaŭ ĉio fabelecon kaj originalecon.'

La konkursaĵoj estu senditaj poŝte kaj alvenu plej laste la 15-an de septembro 2003. 'La rezultojn oni publikigos samtempe kun tiuj de la finna konkurso meze de oktobro, kiam oni festas la nomtagon de Satu (finna vorto por fabelo). En ĉiu branĉo oni principe aljuĝos tri premiojn. Inter la gajnintoj de la unua premio la ĵurio elektos la laŭreaton de la ĉefpremio, Fabelo Internacia,' tiel Buller.

Renato Corsetti, prezidanto de UEA, tute bonvenigas la lanĉon de la konkurso por origine en Esperanto verkitaj fabeloj. 'La fabelkonkurso, kiu estas agado per kaj por Esperanto kaj agado farebla de individuaj membroj de UEA tute indas. Mi esperas ke niaj membroj povus kunhelpi sendante la informon pri la konkurso al siaj naciaj kaj lokaj listoj. Se io estas inda, kial ne kunlabori por realigi ĝin?'

Sed ĉu la konkurso vere estas tiom alloga? 'Pasintjare la konkurso ekzemple donis eksterordinaran publikecon al Esperanto en Kroatio, ĉar la ĉefpremion gajnis la 12-jara Stefani Strunjak, kiu fariĝis famulo en sia lando kaj aperis plurfoje ankaŭ en televido,' klarigas Buller. Li ankaŭ samopinias kun la UEA-prezidanto emfazante la neceson diskonigi la konkurson kaj varbi konkursaĵojn: 'Estus bedaŭrinde, se necesus nuligi la Esperanto-branĉon, ĉar novaĵo pri tio estus malreklamo por Esperanto. Ni evitu tion.'

Pliaj informoj ĉe: <http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.htm>

Komunikad-centro

RETA ESPERANTO-LERNADO EKSPLODAS

Pli kaj pli novaj esperantistoj lernas pere de la reto kaj la pli grava retejo ja registras pli ol 30 000 vizitojn ĉiumonate. 'La reto fariĝas esenca ilo por Esperanto en multe da landoj,' rimarkas Marko Naoki Lins de la Brusela Komunikadcentro. Pro tio ke la reta Esperanto-lernado eksplodas aktivuloj en la movado nun volas pli da statistikoj pri kiom da homoj nun rete lernas Esperanton. 'Mi aparte interesiĝas ekscii pri la multnombraj Esperanto-retkursoj kaj ilia sukceso. Aktivuloj devas pli bone plani kaj allogi novajn lernantojn,' klarigas Lins. 'Mi ege petas ĉian statistikan kaj konkretan materialon pri nombro da kursoj dum kiu periodo, kiom kostas la kurso, la kvanto da korektantoj ktp.' Lins volas scii kiom gravas retaj kursoj en la instrua laboro de esperantistoj tra la mondo. Ne ankoraŭ estas studo pri la buĝetoj de E-asocioj dediĉitaj al retaj kursoj, nek pri la tempo uzita por organizi kursojn. 'Ni ne havas superrigardon pri chiuj kursoj, nek pri la didaktikaj konceptoj kaj en kiuj lingvoj la retkursoj estas ofertitaj.'

Kvankam tute mankas konkretaj informoj, E-retkursoj ŝajne ne timigas lernantojn. 'Kvardek tagojn post sia lanĉo <http://lernu.net> - lernu! atingis la nombron de 400 registritaj uzantoj el pli ol 40 landoj kaj pli ol 8 000 vizitoj,' fieras la teamo de Lernu.net. La ttt-ejo alportis E-kursajn retejojn al nova nivelo da profesieco. Ĝi ankaŭ montras la kreskantan kunlaboron inter E-instruistoj. Ĉi-maniere homoj povas, anstataŭ verki kurson de la komenco, uzi la jam faritan laboron kaj plibonigi ĝin per sia kontribuo. Tiel la ontaj kursverkantoj havas eĉ pli bonan bazon por eki, kaj la kvalito kreskos. 'Lernu!' estas reta kursejo, loko en kiu oni trovas plurajn retkursojn kaj multajn aliajn helpilojn por informiĝi pri Esperanto kaj lerni ĝin, en diversaj lingvoj. Do, nun, kiam iu verkas Esperanto-kurson por interreto, tiu ne devas fari la tutan laboron de la komenco, sed povas utiligi la ilojn kiujn aliaj jam faris kaj kiuj ekzistas ĉe "lernu!", kiel ekz: traduksistemo, enretaj vortaroj, informoj pri Esperanto kaj lingvoprezento, E-muziko kun legeblaj tekstoj, gramatiksuperrigardo kun ekzemploj ktp ..."

Eĉ pli tradicia en la movado estas elŝutebla lernprogramo, tradukita al pli ol dek lingvoj, ĉe (<http://ikurso.net>). 'En la tempo de Zamenhof, tiu komunikado okazis ĉefe per letero,' klarigas la kreinto de la programo 'Kurso de Esperanto' Carlos Alberto Alves Pereira. 'Esperanto jam malprofitis la rimedojn de radio kaj televido. Analoĝe, nun Esperanto ne povas preteratenti la helikopteron de interreto,' filozofias Carlos. Li verkis belan, profesian kaj senpagan programon kiu eĉ instruas la elparolon de Esperanto.

Lins havas pli praktikan konsilon al esperantistoj kiuj jam havas aŭ planas verki novajn kursojn: 'Kontaktu aliajn antaŭe kiel ekzemple la teamon de Lernu.net kaj laboru kune.' Informu Markon Lins pri via retkurso (markolins@web.de)

Komunikad-centro/ĝangalo.com

TTT-EJO DE UEA HAVAS NOVAN FASADON

'Post pluraj monatoj de persista laboro la retejo de UEA ekde la 7a de marto ŝanĝis sian jam kutiman malhele verdan koloron je intensan bluan,' anoncas Andrej Grigorjevskij, UEA-estrarano respondeca pri informado. 'Krome, ŝanĝiĝis kaj iĝis pli oportuna la navigado en la retejo. Aldoniĝis kaj aktualiĝis pli ol triono el ĝiaj nunaj 934 paĝoj.' La laboron faris Dirko Bindman [Dirk Bindmann], el Germanio, kiu laboris pri la aspektigo kaj navigado, kaj Grigorjevskij el Rusio, kiu zorgas pri la enhavo kaj rekodigo. 'Enhavo la retejo nun pli similas al reta Gvidlibro pri Esperanto-movado. Ĉi tie estas listoj de landaj asocioj, fakaj asocioj, kulturaj centroj kaj kursejoj, partoj pri informado, instruado, listoj de retaj grupoj por UEA-membroj', klarigas Grigorjevskij. 'Bonega laboro! Gratulon kaj dankon al Andrej kaj Dirko. La retejo de UEA iĝis eĉ pli informriĉa, facile uzebla kaj bela,' diras longtempa membro de UEA. Tamen estas kelkaj kritikoj. La ttt-ejo estas nur konsultebla en ses lingvoj: Esperante, angle, france, germane, hispane, portugale, ruse. Informoj pri Kanada Esperanto-Asocio troviĝas nur pere de la franclingva ligilo - per la anglalingva estas ankoraŭ neniu spuro. 'Pri rimarkitaj eraroj, kun ĉiajspecaj rimarkoj, bonvolu adresi vin al la adreso reto@uea.org' alvokas UEA-estrarano Grigorjevskij.

Komunikad-centro/ĝangalo.com

Nova krucvortenigmo por turmenti (kaj amuzi) vin.

Nova krucvortenigmo por turmenti (kaj amuzi) vin.

1	2	3		4	5	6	7	8		9	10	11	12	13
14				15						16				
17			18							19				
20							21		22					
	23				24	25		26			27	28	29	
				30			31		32					33
34		35						36		37				
					38				39					
40	41		42	43		44				45				
46					47		48							
	49					50		51			52	53	54	
					55			56		57				58
59	60	61	62			63		64	65					
66						67						68		
69						70							71	

Ankoraŭfoje dankon al Don Reble

(r) indikas radikon

Transen

- 1 buŝa ulcereto (r)
- 4 rapida muzikaĵo (r)
- 9 duecan
- 14 fari ion novan (r)
- 15 surŝutu pulvoron
- 16 laŭnatura aliformiĝo (r)
- 17 neatendite alvenis
- 19 kuzativo de 11-suben
- 20 vidorgano
- 21 elpecetigi (r)
- 23 pago al regno (r)
- 26 posedas lokon
- 30 spirito de homo (r)
- 32 esprimita kontraŭsignife
- 34 apudan
- 37 stangeto de arbo (r)
- 38 konusforma legomo (r)
- 40 enira imposto (r)
- 44 pavilono por varma sezono
- 46 surmetos tavolon de valormetalo
- 48 stranga etulo
- 49 faras laŭ difinita aspekto
- 51 adiciu
- 55 juvelŝtono el lakteblanka siliko (r)
- 57 teksanta besteto (r)
- 59 malmilitan
- 63 kunigis pecetojn kaj fendetojn
- 66 malkuna (r)
- 67 protesta alvoko
- 68 longa piedvesto (r)
- 69 forte fiksita
- 70 agokampo (r)
- 71 iu homo

Suben

- 1 turnlinio
- 2 rezultato (r)
- 3 timego (r)
- 4 bonopinias
- 5 dumtempe aĉeti
- 6 malfraŭla ulo (r)
- 7 malvarmumego (r)
- 8 forpelanto de Napoleono
- 9 korpa malordo (r)
- 10 malnepo
- 11 longa, flirtanta vesto (r)
- 12 ekstrema flanko
- 13 estantece
- 18 kompare grande
- 22 longa neĝglitilo (r)
- 24 ununura (r)
- 25 sentas danĝeron
- 27 ŝvitrueto (r)
- 28 naĝbirdo
- 29 prefikso kia "mem"
- 31 oceanon
- 33 malbona (r)
- 35 diboĉo
- 36 signas per vorto
- 39 ne ellasu
- 40 sekve
- 41 senpatrulo (r)
- 42 kulturebla kampo (r)
- 43 pervorte distingigonta
- 45 longan rakonton
- 47 lavila substanco (r)
- 50 judripoztago (r)
- 52 moviĝu
- 53 femuro kaj kruro
- 54 kuniĝon
- 56 lenso pligrandiga (r)
- 58 ekzisti (r)
- 59 uzi jetilon (r)
- 60 vegetalo kia celerio (r)
- 61 slavestro (r)
- 62 militprovizi (r)
- 64 homarhejmo (r)
- 65 grasa fluaĵo (r)

LA AVENTUROJ DE SUPERZAM MODERNA HEROJ
N.º 4

... KAJ DECIDIS, KE MIA DEVO ESTAS HELPI LAŬBLE LA TUTAN HOMARON ĈEFE EN NENOPOLO, KIE ĜIO DKAZAS NEŬTRALE KAJ SINCERE ...

... DO MI PENSIS AL MI, "KIEL MI POVAS SAĜE UZI MIAJN NOVAJN SUPERHOMAJN FORTOJN?"

UNIVERSITATĜ DE NENOPOLO

... SED POR TIUN FARI KIEL EBLE PLEJ EFIKE, MI DEVIS PRENI ALINOMON. DO MI FARIĜIS PROFESORO DOKTORO LAPLUMO EN LA UNIVERSITATĜ ...

SED KIO ESTIS TIU FLAVA RADIO?

HO, TIO ESTIS RADIO DE BELSTOKITO, LA SUB-STANCO KIUN INVENTIS BELFRUNT. MALLONGE LI NOMIS ĜIN "ITO"

... JU PLI FORTA MI ESTIS, DES PLI FORTE ĜI EFIKIS!

... SED FELIĜE, TIU PRINCIPARO DE LA FROSTA VALDO, KIUN VI, RETO KAJ RIKO, LAUTLEGIS POR MI, TIEL KONFUZIS MIAN MALAMIKON, KE LI FALIS TEREK, SENMENA.

EL KAŜITA ANGULO DE LA URBA DOMO VENAS STRANĜA RIDO ...

Hi-Hi-Hi-Hi-Hi!

... LA VERDA STELO SUR MIA SUPERFORTA BRUSTO ESTIS MEMORIGO PRI MIA BEDAŬRINDA PLANEDO ...

... FLAVO ESTAS LA KOLORO DE MALKURAĜO, KAJ LA MALKURAĜO DE BELFRUNT, AŬ KRANIULO, ESTIS TIEL FORTA KAJ PROFUNDE RAPIKINTA, KE ĜI BONEĜE EFIKIS ĈE MI!

KAJ DUM SUPERZAM PAROLAS ALVENAS NOVAĜO PER LA POŝA KOMUNIKILO DE RETO ...

GRAVA ANONCO!

JUS OKAZIS MISTERA EKSPLODO EN LA URBA CENTRO. NI BEZONAS HELPON!

TAMEN, TIO NE TRO LONGE DAŬROS, ĈAR NENIU ORDINARA KARCIRO POZOS ENTENI TIUN FIAN DEMONON!

KAJ DUM SUPERZAM PAROLAS ALVENAS NOVAĜO PER LA POŝA KOMUNIKILO DE RETO ...

GRAVA ANONCO!

JUS OKAZIS MISTERA EKSPLODO EN LA URBA CENTRO. NI BEZONAS HELPON!

... KAJ DECIDIS, KE MIA DEVO ESTAS HELPI LAŬBLE LA TUTAN HOMARON ĈEFE EN NENOPOLO, KIE ĜIO DKAZAS NEŬTRALE KAJ SINCERE ...

... DO MI PENSIS AL MI, "KIEL MI POVAS SAĜE UZI MIAJN NOVAJN SUPERHOMAJN FORTOJN?"

UNIVERSITATĜ DE NENOPOLO

... SED POR TIUN FARI KIEL EBLE PLEJ EFIKE, MI DEVIS PRENI ALINOMON. DO MI FARIĜIS PROFESORO DOKTORO LAPLUMO EN LA UNIVERSITATĜ ...

SED KIO ESTIS TIU FLAVA RADIO?

HO, TIO ESTIS RADIO DE BELSTOKITO, LA SUB-STANCO KIUN INVENTIS BELFRUNT. MALLONGE LI NOMIS ĜIN "ITO"

... JU PLI FORTA MI ESTIS, DES PLI FORTE ĜI EFIKIS!

... SED FELIĜE, TIU PRINCIPARO DE LA FROSTA VALDO, KIUN VI, RETO KAJ RIKO, LAUTLEGIS POR MI, TIEL KONFUZIS MIAN MALAMIKON, KE LI FALIS TEREK, SENMENA.

EL KAŜITA ANGULO DE LA URBA DOMO VENAS STRANĜA RIDO ...

Hi-Hi-Hi-Hi-Hi!

... LA VERDA STELO SUR MIA SUPERFORTA BRUSTO ESTIS MEMORIGO PRI MIA BEDAŬRINDA PLANEDO ...

... FLAVO ESTAS LA KOLORO DE MALKURAĜO, KAJ LA MALKURAĜO DE BELFRUNT, AŬ KRANIULO, ESTIS TIEL FORTA KAJ PROFUNDE RAPIKINTA, KE ĜI BONEĜE EFIKIS ĈE MI!

KAJ DUM SUPERZAM PAROLAS ALVENAS NOVAĜO PER LA POŝA KOMUNIKILO DE RETO ...

GRAVA ANONCO!

JUS OKAZIS MISTERA EKSPLODO EN LA URBA CENTRO. NI BEZONAS HELPON!

PRO LA EKSPLODO DE TIU "MIRAKLA INVENTAĜO," IO OKAZIS AL NIA KARAJ PLANEDO ...

NIA HEROJ DAŬRIĜAS SIAN LONGAN HISTORION ...

DEVAS INFORMI VIN KE LA PLANEDO ...

MIA PATRO, KIU ANKAŬ ESTIS INVENTEMA, DUM KELKAJ JAROJ ESTIS PRETIGANTA SPECIALAN FLUGMASINON ...

NUR MIU PERSONU POVAS IRI EN ĜI!

... KAJ FINE ALVENIS ALLA TERO.

... AŬ PLI PRECIZE EN LA LAĜO DE NENOPOLA CENTRA PARKO!

... KIAM MI VEKIĜIS, MI TROVIS MIN PLI AĜA ...

MIA FILO LUDIVO, SE IAM AJN VI TROVAS KE VI HAVAS SUPERHOMAJN FORTOJN, UZU ILIN SAĜE!

JES, TATRO!

... TIEL, ANSTATAŬ DRONI, MI POVIS ESKAPI EL LA FLUGSIPĜ.

... SED MI HAVIS SUPERHOMAJN FORTOJN!

... SUBITE MI MEMORIS TIUN, KION DIRIS MIA PATRO KIAM MI ESTIS NURA KNABO ...

LI DECIDIS, KE MI ESKAPU PER ĜI DE NIA MORTONTA STELO ...

BUM!

STRANĜA OBJEKTO EN LAĜO!

NENOPOLA HEROLDO

... ESTIS FORPUŜITA DE SIA ORBITO KAJ NEEVITEBLE PEREOS POST KELKAJ MONATOJ EN LA PLEJ FORA SPACO !!!